# tejo:aktuale

n°503 | Aprilo 2025

**Karaj abonantoj, rebonvenon. Jen via raporto pri la plej freŝaj novaĵoj de la TEJO-mondo**. Se mankis al vi renkontiĝoj kun amikoj en esperantista etoso, jen la fino de via saŭdado. Revenas **Retoso**, via plej ŝatata reta evento de la jaro! Festu kun esperantistoj de Ameriko, Azio, Afriko, Oceanio kaj Eŭropo. Se la kvar tagoj de ĝuo sopirigos vin pri pli da renkontiĝoj, bonŝance la eventa sezono estas preparita por bonvenigi vin per plej diversaj, lernigaj kaj amuzaj oportunoj eksterrete. Malfacilos decidi... Jen via defio!

## ALVOKOJ




Dum IJK, **skriba C1-nivela KER-ekzamensesio** okazos **la 14-an de aŭgusto 2025 (ĵaŭdo)**. Por ke la ekzameno povu okazi, necesas minimume 12 ekzameniĝantoj. Individuaj membroj de TEJO povas **ricevi repagon** de 20€ post la ekzameniĝo.

Ĉu vi ŝatus profiti de la okazo? Aliĝu nun al la ekzamensesio.




👊 Junulo, ĉu vi loĝas en Azio aŭ Oceanio? Ĉu vi volas ricevi financan subtenon por partopreni en IJK 2025 en Indonezio? **Kandidatiĝu por la fonduso "Partoprenu IJK-n" de TEJO!**

TEJO malfermas duan alvokon de la konkurso "Partoprenu IJK-n" 2025" specife por junuloj de Azio kaj Oceanio. Legu la plenan alvokon kaj kandidatiĝu **ĝis la 28-a de majo!**

## EVENTOJ




Post naŭ tagoj komenciĝos 💜 Retoso 💗! Renkontiĝu kun esperantistoj de la tuta mondo en la plej malaĉa reta evento de TEJO, **de la 9-a ĝis la 12-a de majo**.

Kvar tagoj de amuzo, festado kaj lernado atendas vin. Koncertoj, diskutrondoj, ludoj,

prelegoj, legoklubo, venu sperti tion ĉi kun ni! La **bunta programo** estos alirebla por ĉiuj, kun programeroj taŭgaj por ĉiuj horzonoj. 🌍

Vi ankaŭ povos renkonti homojn ekster la programo, en la babilejoj aŭ virtualaj ĉambroj dezajnitaj por vi.

Vizitu nian paĝon kaj aliĝu tuj. Partopreni en Retoso estas tute senpage. Profitu kaj invitu viajn amikojn, novuloj ankaŭ bonvenas!

Daŭre eblas kontribui al la programo.




Kutimaj skoltoj organizas vespermanĝon por festi kun amikoj kaj gepatroj, kaj por iom enspezi. La Verdaj Skoltoj organizas kongreson de 3 ĝis 5 tagoj. **PEKO** iĝis LA kunveno en Belgio. Ĉi-jare ĝi okazos en Tilff, **de la 16-a ĝis la 18-a de majo**. NEPRE venu kaj invitu viajn amikojn, genevojn, genepojn, najbarojn kaj E-lernantojn!




Plena bileto al **Roskilde Festival** en Danio, kun famegaj mondaj steluloj (kutima kosto: 320 EUR) estos por vi senpaga kontraŭ 3 x 8 h da simpla, grupa, **volontula deĵoro** – servo ĉe pordegoj al la scenejoj. La evento okazos **de la 28-a de junio ĝis la 5-a de julio**. La tuta trejnado okazos surloke, ne necesas esti sperta, nek paroli la danan. ;)

**RESTAS 3 LIBERAJ LOKOJ!**

Nia laborlingvo estas Esperanto. Ni aparte varme bonvenigas novulojn, kiuj volas ekuzi la lingvon vive en mojosa, junulara estoso kaj renkonti aliajn esperantistojn! Vi povas inviti ankaŭ viajn ne-esperantajn amikojn por montri al ili Esperanton. Estos ankaŭ baza E-kurso dum libera tempo antaŭ koncertoj.




Kio okazos dum la junulara programo de la **Universala Kongreso** en Brno, **de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto**?

Parto de la programo estos posttagmezaj ekskursoj, perfekte taŭgaj por festemaj junuloj! Estas planata vizito al eta loka **bierfarejo** tre proksime de la kongresejo, kie vi lernos pri bierproduktado kaj, kompreneble, havos la eblon gustumi la bieron.

Alia ekskurseto prezentos la kongresurbon el iom alia vidpunkto en la amuza **"Festo-tramo"**. Ni planas ankaŭ pliajn ekskursojn kaj aliajn programerojn, sekvu la UK-on en Instagram, Facebook kaj Telegram por resti ĝisdata!




Ĉu vi volas partopreni mojosan festivalon en **Sudfrancio** kaj ĝui buntan **muzikan programon**? Ĉu vi volas esperantumi dum tuta semajno kaj festumi ĝis la nokto, nokto fin'? Ĉu vi ne povas vojaĝi ĝis Indonezio por partopreni IJK-n? **Venu al FESTO!**

Post pli ol jardeklonga paŭzo, FESTO revenas. Ĝi okazos de la **17-a ĝis la 24-a de aŭgusto en Moissac**, Francio. Ĝin organizas la **Junulara Esperanta Franca Organizo** (JEFO) kun muzika programo aranĝita kun **EUROKKA**. Sekvu niajn progresojn kaj la informojn ĉi tie kaj Telegrame!

FESTO okazos en la metilernejo en la bela urbeto Moissac, proksime de Tuluzo. Koncertoj, **naĝejo**, somera etoso, ĉu vi bezonas pli?




Jam konfirmite! **Filipina Junulara Renkontiĝo (FAJRO) 2025,** la ĉefa evento de **Filipina Esperanto-Junularo (FEJ)** kaj ankaŭ oficiala postkongresa evento de IJK 2025, okazos **de la 22-a ĝis la 24-a de aŭgusto** en la marborda urbeto Lian, proksime de Manilo.

Ĉu vi ŝatus pli longe resti en Sudorienta Azio post IJK 2025 kaj malkovri plian landon profitante de via ĉeesto en la regiono? **Venu al Filipinoj!** Belaj plaĝoj, mirinda naturo, kaj multaj pliaj mojosaj filipinaj esperantistoj (*krom Albert*) atendas vin.

Kun via ĉeesto, FAJRO 2025 iĝos nia unua vere internacia renkontiĝo en Filipinoj. Ĉu vi troviĝos en ĉi tiu historia momento por la loka movado?

Detaloj kaj aliĝilo baldaŭ aperos en nia retejo. Dume, aliĝu al nia babilgrupo kaj sekvu nin en Instagram por esti inter la unuaj kiuj informiĝos!

Kompreneble, ne forgesu pri nia plej




granda, plej mojosa, kaj plej internacia junulara evento de la jaro: [IJK 2025](#) en Cisarua, Indonezio, **de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto**! Jam aliĝis ĝis hodiaŭ sume **134 homoj** el **32 landoj**. Ĉu ankaŭ vi aliĝos por ke ni atingu 150? Jes, ĉu ne? Ĉu neeeee? 👉👈

La tria aliĝperiodo daŭras ĝis la 30-a de junio, sed ne prokrastu vian aliĝon. [Proponu ankaŭ vian programeron](#) por riĉigi ĉies sperton.

## ANONCOJ




Entute **13 junuloj** gajnis en la **konkurso "Partoprenu IJK-n"**! Tio estas la rekorde plej granda grupo de gajnintoj en la lastatempa historio de TEJO, kun subteno de plurdekoj da donacintoj.

La gajnintoj ricevos financan subtenon por la vojaĝo kaj interŝanĝe ili helpos en la organizado de la kongreso kaj riĉigos ĝian programon.

Tiu nombro povos ankoraŭ kreski en la dua rondo de la konkurso.

Vizitu la [ĝeneralan donacpaĝon](#) kaj ekkonu la [ĝisnunajn gajnintojn](#).

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**




Aprilo estos plena je klasikaj esperantistaj spertoj: retaj debatoj, lingvaj dilemoj, kaj la eterna demando "Kiam estos la Fina Venko?" Kio ajn via signo, certiĝu, ke vi havas sufiĉe da kafo kaj pacienco por alfronti la monaton!

♈Feliĉan naskiĝmonaton, Arieso! Ĉi-jare vi decidas festi ne kun kuko, sed kun impeta retleciono pri la uzo de "-ig-" kaj "-iĝ-". Ĉu




viaj amikoj aprezos ĝin? Tio dependas de kiom da ili estas en via Telegram-publiko. Atentu: nova retgrupo pri “radikala reformo de la akuzativo” tentos vin. Rezistu. Eble.




♉Vi sentas, ke vi estas la sola racia voĉo en via loka klubo. Kaj eble vi pravas. Tamen, aprilo rekomendas al vi provi *malpli* korekti la prononcon de aliaj kaj *pli* ĝui la fakton, ke almenaŭ ili ne diras “saluton” kun angla akĉento. Se vi sukcesos ridi dufoje ĉi-monate dum Zoom-kunsido, konsideru tion venko.




♊Vi subite sentas bezonon aliĝi al *ĉiuj* komisionoj de TEJO. Denove. Ĉu vi havas tempon? Ne. Ĉu vi faros tion ĉiukaze? Kompreneble. Via energia menso amas kaoson – sed ĉu vi povas almenaŭ unufoje legi la protokolon antaŭ voĉdoni? (Ĉu? Nu, ni vidas.)




♋Aprilo vekas vian nostalgion: vi revas pri tiuj pasintaj IJK-oj kie la vespera programo konsistis el gitaro, kandeloj kaj interŝanĝo de adresoj por skribi paperleterojn. Sed nun estas 2025 kaj la plej proksima afero estas TikTok-filtro kun verdaj steloj. Provu ne tro malakcepti la novan generacion – eĉ se ĝi opinias, ke *lernu!* estas eksmoda.




♌Vi volas lerni *ĉion* pri Esperanta retoriko por regi la venontan retan debaton. Bonege! Sed se vi ekuzas la vorton “do” kvinfoje en unu frazo, eble vi tro profundiĝis. Ĉi-monate vi povos brili – precipe se vi ne forgesos mutigi vin, kiam vi maĉas dum kunsido.




♍Vi verkis 14-paĝan liston de ĉiuj gramatikaj eraroj en la lasta numero de *Kontakto*, sed vi hezitas sendi ĝin. Aprilo estas via tempo por lerni lasi malgravajn erarojn pasi… aŭ almenaŭ korekti ilin silente en Vikipedio sen informi la originalan aŭtoron. Tiel vi ne riskas konflikton *kaj* vi konservas vian reputacion.




♎Dum aliaj argumentas pri la estonteco de la movado, vi proponas interkomprenon… denove. Sed eble ĉi-monate vi laciĝas esti la diplomato. Estas tute en ordo diri “Mi forlasas ĉi tiun fadenon” kaj reiri al trankvila legado de *La Aventuroj de Jozefo kaj la Vojaĝanta Akuzativo*.

♏Vi suspektas, ke via loka grupo sekrete renkontiĝas sen vi. Kaj… eble vi pravas. Sed ĉu tio estas ĉar ili malŝatas vin aŭ ĉar




vi lastfoje proponis fari ĉiujn ludojn en Volapuko? Aprilo estas la perfekta momento por renkonti novajn homojn – nur ne tuj enkonduku ilin en vian 37-punktan programon por movada regenerado.




♐Aventuro vokas! Ĉu vi devos iri al la najbara urbo por renkonti alian esperantiston “nur por kafumi”? Tute eblas. Ĉu vi poste hazarde proponos fondi novan landan sekcion? Preskaŭ certe. Aprilo estas via monato por novaj kontaktoj – sed provu ne tuj demandi pri ilia nivelo laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro.




♑Vi organizas, administras, plenumas… sed kiam lastfoje vi ĝuis *nur* partopreni? Aprilo konsilas vin cedi la prezidantecon por unu semajno kaj simple esti unu el la homoj, kiuj ĝuas *kanti en Esperanto*, eĉ se ili ne scias la ĝustajn akcentojn. Via spirito bezonas paŭzon pli ol via retpoŝto.




♒Ĉi-monate vi havas ideon por nova tutmonda Esperanta platformo, kiu kombinas forumon, lernilon, socian reton kaj horoskopojn (kiel ĉi tiuj). Sed antaŭ ol registri ses domajnojn, demandu vin: ĉu vi *verŝajne* finos ĝin antaŭ 2027? Vi ne ĉesas revi, sed eble estas tempo reviziti ankaŭ iun pli malnovan projekton…




♓Via emocia intuicio estas forta kaj ĉi-monate vi sentas la tutan pezon de la mondo – kaj ankaŭ de ĉiuj pasintaj neplenigitaj movadaj raportoj. Sed ne malesperu. Aprilo alportos al vi inspiron, precipe dum senpretenda babileto kun nekonato en Discord, kiu hazarde ŝatas la samajn Esperantajn ŝercojn kiel vi.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive

kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-Volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2025 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands

INTUIT mailchimp